# nia voĉo

## madrida esperanto-liceo aprilo 2026

### SEMAJNO DE LA LIBRO EN MADRIDO

Okaze de la internacia Tago de la Libro, la 23-an de aprilo, je la 19-a horo, ni prezentos denove la libron de Ana Manero, “Maruja Mallo: Mucho más que una artista de vanguardia”, pri tiu elstara artistino de la komenco de la pasinta jarcento. La libro, eldonita de SATeH (SAT en Hispanio), estas dulingva, hispana kaj esperanta. Tio okazos en librejo nomata “Espacio Late”, laborejo de interesa alternativa revuo, kiu organizas informajn agadojn, kaj troviĝas tre proksime al nia sidejo, en la strato San Hermenegildo, 5. Ĝi krome disponas je spaco por kafejo (https://espaciolate.es/).

La prezentado estos verŝajne inkludita en evento nomata LIBROMAD aŭ Semajno de la Libroj, organizota de la regiona registaro. En pasintaj jaroj tiu ĉi organizis tradicie la eventon “La Nokto de la libroj”, kun la partopreno de asocioj, sed ĉijare oni modifis la kunvokon. Ĉiukaze, ankaŭ ĉijare Esperanto havos sian rolon.

### LEGADO DE DON KIĤOTO

Alia tradicia agado en tiuj ĉi datoj estas nia partopreno en la legado de Don Quijote en la kulturcentro Círculo de Bellas Artes. Ni jam rezervis spacon por du legantoj: ni legos du pecojn en Esperanto, la vendredon, la 24-an, je 20,30. Ankoraŭ estas malferma la elektado de la volontuloj, kaj, kiel kutime, ni prioritatigas la legadon fare de novuloj, kiuj neniam partoprenis ĝis nun en tiu ĉi interesa iniciato. Do, bv kontakti kun Liceo kiom eble plej baldaŭ por rezervi vian vicon.

Krome, se iu el vi deziras akompani la legantojn sed ne mem legi bv veni kun ni, ĉirkaŭ duonhoron antaŭe, por spekti la eventon.

Vi povas trovi aliajn aktivadojn, ĉirkaŭ la evento, kaj probable spekti ĝin realtempe ĉe: https://www.circulobellasartes.com/humanidades/xxx-lectura-continuada-del-quijote-2026/.

### PRELEGOJ EN PASINTA MARTO


La 2-an de marto, samideano Fráncel Briel prelegis duafoje pri Yumeiho-terapio, kaj montris praktike la teknikon.

La 26-an de marto Juan del Castillo prelegis en la sidejo de Fuenlabrada Esperanto-Ligo pri Blissymbolics, speco de konstruita lingvaĵo bazita sur simboloj, kaj montris ĝiajn bazajn ecojn kaj eblecojn.





## ALIĜO AL LA SOMERAJ KONGRESOJ




Memoru kaj rapidu: je la 31-a de marto fermiĝas la rabatita aliĝperiodo por la 84-a Hispana Esperanto-Kongreso 2026, kiu okazos en Portugalete (Biskajo) en julio. Ĉu vi estos la kongresano numero 100? Ni memorigas ke informojn oni povas trovi en la adreso: https://kongreso.esperanto.es/, kun skizo de la programo, la aliĝilo kaj la listo de aliĝintoj.

Ankaŭ progresas la organizado de la kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu okazos en Leono depost la 19-a de julio, tuj post la hispana kongreso. Vi povas legi la ĉefajn informojn en la retadreso: https://sat2026leono.org/, inklude de la unua programo, kiu havos kiel bazan temon "Paco kaj militoj. Datreveno de la Hispana Enlanda Milito".

Ankaŭ baldaŭ, konkrete la 15-an de aprilo, finiĝos aliĝperiodo por la 82-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK), kiu okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026 en iama monaĥejo en la urbeto Tiana, nur 15 km for de Barcelona. Tiu estos mirinda ŝanco por partopreni internacian etoson, kaj oni eĉ povos ĝui la sunan eklipson kiu estos videbla ĉe ni la 12-an de aŭgusto. Vidu pliajn detalojn ĉe la retejo https://ijk2026.tejo.org/.

La 31-a de marto estas la limperiodo por rabatita kotizo por la 111-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Graco (Graz, Aŭstrio) ekde la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2026. Vidu la plenan kotiztabelon ĉe https://uea.org/kongresoj/kotiztabelo, kaj por partopreni, aliĝu ĉe: https://uk.esperanto.net.

## MADRIDAJ RENKONTOJ

La sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

La sabata kunveno okazos la duan sabaton, nome 11-an de aprilo, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera kaj sen programo.

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia reto *Bluesky* vi povas trovi nin ĉe: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com